

La Verda Stelo



**SEKCIO GRONINGEN-DRENTE
&
FRISA ESPERANTISTA RONDO**

marto 2015



eldono de

**ESPERANTO
NOORD-NEDERLAND**

**ESPERANTO-KLUBO
GRONINGEN-DRENTE**

prezidanto

s-ro J.B. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. +3150 527 45 72
retadreso:
johan.swenker@xs4all.nl

sekretario

s-ino N.R. Kiel-Klunder
G. Sterringastraat 6o
9728 VV Groningen
tel. +31505251436
retadreso: nrkielklunder@hotmail.com

kasisto

s-ro R. Hofman
Irenestraat 9o
9744 CK Groningen
tel +310642247155
richardhofman@home.nl

FRISA ESPERANTISTA RONDO

s-ro W. Akkerman
Westerein 14 a
8571 GB Harich (Frl)
tel. +3151 460 22 72
retadreso: wiebrenakkerman@hetnet.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

kunvenejo

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas
de la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J.B. Swenker, tel. +3150 527 45 72

redakcio

J.B. Swenker, N.R. Kiel-Klunder
retadreso: la.verda.stelo@xs4all.nl



Enhavo

- 3 klubkunvenoj
- 4 naskiĝtagoj
- 5 pri la nordo
- 15 invitoj

Ĉe la kovrilpaĝo

Sur la kovrilpaĝo vi vidas la sunhorloĝon de Prinsentuin (Groningeno). Ĝi montras krom la horojn ankaŭ la monaton. Kaj tial ni uzis la bildon kiel kovrilpaĝon: daŭris tro longe antaŭ ol ĉi tiu *La Verda Stelo* aperis. Ni pardonpetas. La abonantoj ne ricevis informojn en la pasinta jaro. Ili kompreneble ne pagu por 2014.

Detalaj sciindaĵoj pri la sunhorloĝo vi trovas en Interreto je <http://www.wijzerweb.be/groningen.html>.

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2015

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 12,50
Ĝezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement LA VERDA STELO	€ 7,00
Over te maken op ING banknr. IBAN: NL50 INGB 0003 8224 72 t.n.v. ESPERANTO NOORD-NEDERLAND te Groningen	

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van ~~ESPERANTO NEDERLAND~~.

Vandaar dat wij hier ook het rekeningnummer ervan vermelden:

IBAN: NL10 TRIO 0786 8441 67 ten name van Esperanto Nederland te Monnickendam.

Lidmaatschap (incl. abonnement Fen-X)	€ 30,00
Ĝezinslid	€ 10,00

19 marto	distra interparolado (ĉiuj)
16 aprilo <u>18h00</u>	ie kune manĝi (kostoj ĉ. 30 EUR). Bv. aliĝi ĉe Nelly
4 junio <u>10h30</u>	<i>De kosterij, Martinikerkhof 2, Groningen</i>
6 aŭgusto <u>10h30</u>	<i>Scandinavisch dorp, Oude Badweg 1 Eelderwolde</i>
17 septembro	niaj someraj okazaĵoj
1 oktobro	distra interparolado (ĉiuj)
15 oktobro	malferma vespero
29 oktobro	distra interparolado (ĉiuj)
12 novembro	distra interparolado (ĉiuj)
26 novembro	distra interparolado (ĉiuj)
10 decembro <u>18h30</u>	Zamenhof-vespero. Bv. aliĝi ĉe Nelly, kunportu manĝaĵojn kaj trinkaĵojn

- ŝanĝoj rezervitaj -

la plej freŝajn novaĵojn kaj
ŝanĝojn vi trovos en nia
retejo sub la rubriko

Aktuale

<http://pingveno.nl/klubo>

naskiĝtagoj

4 januaro	Wil	Van Ganswijk-Vlasblom
17 januaro	Ab	Ploeg
27 januaro	Ineke	Emmelkamp
8 februaro	Andries	Hovinga
11 februaro	Henk	Van Kappen
28 februaro	Luit	Staghower
24 marto	Bert	Begeman
1 aprilo	Tiny	Bulk-Beenen
6 aprilo	Petra	Van Kappen-van de Kamp
7 aprilo	Ankie	Van der Meer
9 aprilo	Carry	Kleinveld
5 majo	Gonda	Kruijer
7 majo	Gerard	Boer
23 majo	Frans	Schild
25 majo	Albert	Hoekstra
27 majo	Warner	Renken
1 junio	Adri	Oosterwijk-Dominicus
24 junio	S-ro	Snoek
10 aŭgusto	Nelly	Kiel
16 aŭgusto	Koos	Scharroo
30 aŭgusto	Johan	Swenker
3 septembro	Wiebren	Akkerman
5 septembro	Berendina	Brink
7 septembro	Marita	Kruijswijk
17 septembro	Henny	van Hogen-Cornelissen
24 septembro	Els	van derHeij-Alblas
2 oktobro	Fien	Koopmans-Hollenga
29 oktobro	Bets	Dodebier
14 novembro	Greta	Volders
1 decembro	Richard	Hofman




pri la nordo

12 septembro 2013

Ni parolis pri niaj ferioj.

Ineke ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis en Islando. Kvankam la lando havas nur 300.000 enloĝantojn, ĝi tamen havas proprajn kulturon, librojn, muzikon, kaj eĉ proprajn literojn, kiel ð æ þ .



Antaŭe,

kiam ni faris memorlibron pri libertempo, ni metis la varbfoliojn kaj trajnbiletojn tuj en la libron. Nuntempe la memorlibroj venas el la presejoj de *Hema* aŭ *Albert Heijn*. Sed kion pri la varbfolioj? Simple fotu ilin kaj la foto de la varbfolio iĝas parto de la fotaro de la libertempo.

Wil nepre devis resti hejme. Pro akcidento kun la mopedo ŝi ne sufiĉe bone povis sin movi. Ŝi uzis la someran libertempon por ordigi siajn aferojn. Ŝi havas multe da materialoj por instrui infanojn pri Esperanto. Iomete ŝajnis kvazaŭ ŝi verkis sian testamenton: jam decidi kion fari per la objektoj, sed ne jam disdoni ilin.

Nelly estis en Anglujo por kanti en la plej granda katedralo de Anglujo.

La aliaj biciklis dum la somero. Richard kaj Johan simple biciklis en la ĉirkaŭaĵo de Groningeno. Luit iris al sia frato en Hago kaj biciklis en la *Verda Koro* al kastelo de Haar.

26 septembro 2013

Ĉeftemo: Gramatiko.

La venonta kunveno estos Malferma Vespero. Kion ni faros? Kio estos la temo de la programo?

Anstataŭ paroli pri ferioj Wil parolis pri la maniero, en kiu ŝi konatiĝis kun Esperanto. Ŝi pretas tion fari ankaŭ en la Malferma Vespero. Eble Ineke povos tiam paroli pri siaj spertoj dum la UK-o en Islando kaj/aŭ la Mezorianta Esperanto-kunveno en Jerevan, la ĉefurbo de Armenio.

Wil kunportis multajn malnovajn fotojn de la Esperanto-grupo, kiun ŝi gvidis antaŭ proksimume 35 jaroj. Ŝi demandas sin, ĉu UEA eventuale interesiĝas pri la fotoj.

El la stoko de gramatikaĵoj Wil kunportis plurajn foliojn por ekzercigi nin i.a. en la uzado de la akuzativo kaj verboj transitivaj kaj netransitivaj. Estas lernigaj sed ankaŭ malfacilaj temoj.

24 oktobro 2013

Luit prizorgas sian domon: farbas la murojn, instalas novan kuirejon. Do la domo estas iomete ĥaosa. Dume en la ŝranko li trovas duoblaĵojn de libroj. Li kunportis illin por disdoni.

Ni parolis pri diversaj aferoj. Eĉ sen gazeto ni scias la plej gravan aferon de la mondo: la diskutoj pri Nigra Petro. Sed bonvolu legi la oficialan normon NEN 0512 de la Nederlanda Normiga Instituto je <http://www.ouders.nl/pdf/neno512-sinterklaasfeest.pdf>.

Kiam Johan estas ĉe sia grupo de komputilantaj amikoj, ili parolas ne nur pri komputiloj, sed ankaŭ pri lingvoj. Iam li menciis, ke en 2015 okazos Esperanto-kunveno en Lillo, kaj tuj oni montris al Johan, ke kaj la nederlanda nomo "Rijssel"

kaj la franca nomo "Lille" devenas de la sama latina nomo *Ad Insulam* (t.e. "ĉe la insulo"). La artikolo en Vikipedio klarigas tion jene:

La urbo estis fondita kun la latina nomo *Ad Insulam*, kiu signifas "ĉe la Insulo". Ĝi troviĝis en la limregiono inter mezepokaj variantoj de la franca kaj nederlanda lingvoj kaj ricevis en ambaŭ paralelajn tradukojn de la latina nomo: en la malnovfranca *à l'isle* kaj en la malnovnederlanda *ter IJssel*. El tiuj nomoj evoluis paralele la nuntempaj franca kaj nederlanda nomoj Lille kaj Rijssel.

Kaj tiel ni agrable pasigis la vesperon.

7 novembro 2013

Ĉeftemo : La filmo "La ŝipestroj de la Kameleono".

Kiu okazis en Esperantujo?:

Luit ricevis retmesaĝon de amikino en Pollando, kaj li mem okupiĝis pri raporto por siaj korespondgeamikoj pri kelkaj ekskursoj.

Johan ricevis korespondpeton el Kubo sed ne jese reagis.

Wil ricevis mesaĝon de Johan Derks kun peto ĉu la klubo povos gastigi 20 esperantistojn, kiuj intencas vojaĝi tra kelkaj landoj, kaj kiuj dumvoje volonte gastos ĉe "samideanoj". Ni samopiniis, ke ne eblas gastigi tiom da homoj.

Wil ricevis mesaĝon de kursano el Assen, kiu volas vendi sian Esperanto-libron, ĉar li (provizore) ne plu okupiĝos pri Esperanto. Johan ricevis kelkajn malnovajn Esperanto-librojn de sinjorino en la dancklubo. Kun plezuro ni spektis la filmon "La ŝipestroj de la Kameleono". La filmo estis subtitolita en Esperanto. Ni eĉ lernis

novan vorton: "mojose" kiu signifas "het is te gek". En interreto je

<http://mojose.wordpress.com/> (retpaĝaro kun novaĵoj por modernstila, juna generacio) mi trovis jenan eksplikon:

Mojose? *Mojosa* estas adjektivo en Esperanto (la originala kaj plej ofte renkontata formo de la radiko *mojos'*) kun signifo egala al tiu de la angla vorto *cool* en ties signifo de moderna, bonega. Efektive temas pri mallongigo de triradika kunmetaĵo *modernjunstila*. Ĝi estas parto de la junulara Esperanto-slango de la 2000-aj jaroj. La vorto ekestis en novembro de 2003 dum la Tut-Eŭropa Junulara Konferenco seminario (TEJK-seminario) en Sötör (Hungario), kiam oni konstatis la fortan mankon de Esperanto-vorto, kiu signifus la samon kiel la angla vorto *cool*, sed ne en la laŭvorta senco (malvarmeta), sed en alia (moderna, bonega). Malkiel multaj aliaj proponoj pri slangaĵoj, ĝi ekuziĝis kaj enradikiĝis, kvankam ĝis nun preskaŭ nur inter la junuloj.

21 novembro 2013

Wil, Ineke kaj Johan homekipis nian budon dum la publika tago 'Durft u het aan?' Estis la intenco, ke tiun tagon 55+uloj konatiĝu kun asocioj kaj organizoj el la norda parto de Nederlando, kiuj povas signifi ion por pliaĝuloj. La kunveno estis en la kantino de Menzis-konstruaĵo en Groningen. Bedaŭrinde la komunikiloj ne atentis pri la evento, do estis nur malmulte da publiko. La Esperanto-tablo akceptis kvar interesiĝantojn.

Feliĉe Johan ĝuis grupon de muzikantoj, kiu ludis muzikon el la '70-aj jaroj. Wil ĉeestis prelegon por ŝi neinteresan.

Ŝi havas jam kelkajn monatojn du novajn

entuziasmajn kursanojn, Carry kaj Wouter. Kiam Wouter scipovos Esperanton li volonte vizitos la tri-landpunkton (en estintaj tempoj kvar-) kaj deziras paroli kun esperantistoj en la estinta lando Moresneto.

Wouter kunportis bukedon da floroj, kiam Wil estis iom malsana.

La sekva kunveno estas la Zamenhofa festo. Wil proponas inviti ĉiujn membrojn por tiu kunveno poŝte. Ankaŭ antaŭ du jaroj la membroj estis invititaj, kaj tiam estis pli da membroj ol dum regulaj kunvenoj.

La temo de ĉi tiu vespero estis: mia naskiĝurbo.

Luit naskiĝis ne en urbo sed en Veerveenstersluis: 'vilaĝeto inter rivereto, komunuma grundo kaj arbaro' en la komunumo Vlagtwedde. Estis ŝoseranda vilaĝeto apud la Mussel-Aa-kanalo, la Ruiten-Aa-kanalo kaj la Westerwoldse Aa. Pro tiu situo establis sin terpomfarunfabriko. Tra la kanaloj oni alveturigis artefaritan sterkon kaj ŝlimon el Delfzijl por la kamparoj kaj oni forveturigis terpomojn. Luit bone memoris la malbonodoron kaj la feĉon, kiu flosis sur la akvo de la kanaloj. Post la milito oni fermis la kanalojn por ŝipveturado, sed ili nun estas denove malfermitaj por ekskursŝipado. Luit kunportis foton de la ŝipo, sur kiu li grandiĝis. La ŝipo estis nomita Everdina, nomo de avino de Luit. Lia patrino vidis la ŝipon post kelkaj jaroj en Amsterdamo kiel loĝoŝipo.

Wil naskiĝis en Delft.

Delft estas urbo en Zuid-Holland, situanta ĉe la rivero Schie, inter Hago kaj Roterdamo. Delft havas historian urban centron, evoluis en la 19-a jarcento al industria urbo kaj profilas sin nun, per la

ĉeesto de teknika universitato kaj la esplorinstituto TNO, antaŭ ĉio kiel urbo de scio. En la historio de Nederlando Delft antaŭ ĉio estas konata pro tio, ke Vilhelmo la 1-a de Oranje-Nassaŭ dum kelke da tempo rezidis kaj estis murdita tie en 1584. La Oranĝuloj ekde tiam estas entombigitaj en Delft.

Wil kunportis paĝon de Dagblad van het Noorden el 1996, en kiu estas fotoj de i.a. 'Vidaĵo je Delft' kaj 'La malgranda strato de Vermeer' de la fama delfta pentristo *Johannes Vermeer*.

Johan naskiĝis en Heerlen. Li montris fotojn de konstruaĵoj de la heerlena arkitekto *Frits Peutz*, kiu naskiĝis en la naskiĝprovinco de Luit, studis en la naskiĝurbo de Wil kaj laboris en la naskiĝurbo de Johan. Peutz desegnis i.a. la Sanktan Anapreĝejon, kinejon Royal, laŭ la frato de Johan la plej malbela konstruaĵo. Li desegnis la vitran palacon por ŝtofa komercisto *Peter Schunk*, kiu volis magazenon kiel kovritan foiron.

Johan grandiĝis en kvartalo de Heerlen, en kiu ĉiu parolis la nederlandan, sed poste li transloĝiĝis kaj venis en kvartalon, en kiu ĉiu parolis dialekton. La heerlena dialekto estas alia ol ekzemple la maastriĥta. Ilin kaŭzas la Bernrather linio, lingvolimo kie unuflanke oni elparolas k-sonojn (ik, maken) kaj aliflanke ĥ-sonojn (ich, machen).

Johan kunportis eltondaĵalbumon pri la malkonstruo de la minoj en la '70-aj jaroj. Li montris ankaŭ mapon de Heerlen, sur kiu estis klare videbla, ke la minoj trovis sin preskaŭ en la mezparto de Heerlen.

19 decembro 2013

La Zamenhofa festvespero. La salono aspektis alloga, la tablo estis arte ornamita per kristnaskaj branĉetoj kaj paperaj verdaj steloj sur la teleroj. Sur alian tablon ĉiu el ni metis kunportitajn manĝaĵojn: salado, laktuko, spicita kuko, diverspecaj varmaj legomoj, festpanetoj, trinkaĵoj, torto ktp.

Johan bonvenigis nin antaŭ ol Luit enportis tasojn kun bongusta tomatosupo. Ni parolis pri diversaj temoj en la nederlanda lingvo, ĉar du el la ĉeestantoj ankoraŭ ne kapablas konversacii en Esperanto.

Wil kunportis kelkajn Esperanto-ornamaĵojn, kiujn ŝi intencas fordoni kaj voĉlegis du leteretojn el 1981, kiujn ŝi retrovis. Instruistino el Voorthuizen petis tiam sendi iom da informmaterialo por 12-jara korea lernantino, kiu loĝis iom pli ol unu jaro en Nederlando. Tiu intencis paroli pri la internacia lingvo Esperanto, kiam estos ŝia parolvico en la grupo. En la dankletero staris la rezulto. La knabino tre bone prelegis, la klasanoj tre interesiĝis kaj la poento, kiun ŝi ricevis estis 9.

Ni finis la manĝadon per glaciaĵo de Johan kaj kafo kun tortpeco. Estis agrabla festvespero.



9 januaro 2014

Ĉirkaŭ la jarŝanĝo aperis la nova revuo de Esperanto Nederland. Ĝi vere estis nova, sed ne multaj aprezis la ŝanĝojn. Ĝi aspektis malmoderna. Nu, ĉiu rajtas reagi al Gerrit Berveling, kaj ekzemple ekspliki ke la nomo devas esti Fenikso, ni jam prononcas FEN-X en tia maniero.

Ineke demandis pri nia arĥivo. Nu, neniu scias kie estas ĉiuj malnovaj Verdaj Steloj, aŭ la protokoloj de niaj kunvenoj. Jes, kelkaj estas en la hejmo de Johano, sed kie estas nia historio? Se vi havas parton de ĝi nepre ne forĵetu. Ans Bakker havas ligojn kun IISG (Internationaal Instituut voor Sociale Geschiedenis) kie jam estas arĥivoj de FLE kaj Esperanto Nederland.

La programo de la 9-a de januaro 2014 estas *vivanta gazeto*. Tio signifas, ke ni kunportas gazetarajn artikolojn, kaj parolas aŭ diskutas pri la enhavo.

Ekde la 6-a de januaro "*LabNoord*" kaj "*Laboratorium voor Infectieziekten*" kune laboras uzante la nomon "*Certe*". Laŭ ilia presanonco, *certe* venas de Latino, kaj signifas certeco. Aŭ eble tiun nomon elpensis esperantisto ĉe *Certe*?

Mi ne volas skribi pri *Kim Jung Il*, sed tio, kion li faris al sia onklo, estis en la ĵurnalo. Kelkaj homoj esperas, ke tio, kion skribas la ĵurnaloj, estas ne vera.

La angla reĝino pardonis *Alan Turing* kaj lia kondamno pro samseksemo estis forigita el la libroj. Alan Turing estis grava matematikisto kaj komputikisto. Dum la dua mondmilito li rompis la sekretan kodon de la nazioj. Tiel la aliancanoj antaŭsciis tion, kion faros la nazioj. En la komputika scienco li estas tiel grava, ke oni ĉiujare donas la *Premion Turing* al tiu komputikisto, kiu signife kontribuis al la

evoluo de komputiko. La Premion Turing estas por komputikistoj same valora kiel Premio Nobel. Tial multaj komputikistoj dum jaroj petis la reĝinon pardoni Alan Turing. Kaj finfine, 60 jarojn post lia morto, ŝi faris tion.

Ĉu vi kuraĝas manĝi fungojn, kiujn vi mem rikoltas en arbaro? La nederlandanoj ne scias, kiuj fungoj estas manĝeblaj kaj kiuj estas danĝeraj. Sed multaj eksterlandanoj ja scias kiel diferencigi inter fungoj manĝeblaj kaj venenaj. Ili do venas al niaj arbaroj kaj prenas la manĝeblajn fungojn. Simile pri beroj. Feliĉe ni lernis rekoni mirtelojn kaj rubusberojn. Do en arbaro, ni ja manĝas kelkajn specojn de beroj.

23 januaro 2014

La temoj de la kunveno estis: Esperantujo kaj Bildenigmoj.

Esperantujo

Johan denove ricevis korespondpeton de Kubano. Tiu volonte korespondos kun junulo. Wil kunportis la adresojn de kelkaj interesiĝantoj.

Wil denove sendis al sia juna lernanto *Frank* kelkajn librojn i.a. la libron *Robinsono Kruso*.

La Esperanto-sekcio Alkmaar sendis sian informilon "La Fromaĝokloŝo".

La klubo regule ricevas rete la informilojn "Senlime" (de la Esperanto-asocio en la Eŭregiono de Moza-Rejno) kaj "Nia Bulteno" (de la Esperanto-klubo Zamenhof en Nijmegen).

Wil demandis, ĉu inter ni estas aŭskultanto de "Retradio". Ĉiu nee respondis.

Bildenigmoj

Wil kunportis la libreton "Bildenigmoj" de *Onklo Cook* kaj por ĉiu el ni ŝi kopiis paĝon

kun enigmo, kiu pli-malpli aspektas kiel konata enigmo, sed anstataŭ per priskriboj la plenigendaj vortoj estas menciitaj per (kelkfoje malklaraj) desegnaĵoj.

Per du aliaj enigmoj de kvin linioj kun kvin literoj (unu apud la alia kaj unu sub la alia) ni devis trovi kiel eble plej multe da nomoj de floroj kaj legomoj. La sinsekvaj literoj troviĝis en ĉiuj direktoj.

Poste ni dum iom da tempo okupiĝis pri la desegnado de simplaj bildoj kaj la diveno de tiuj bildoj. Alterne iu el ni desegnis bildon kaj la aliaj klopodis diveni kion tiu bildo prezentis.

Tiumaniere venis amuza fino al hejmeca vespero.

6-februaro-2014

Ineke ricevis leteron el Kubo de Yoandra, esperantistino de ni konata. La letero bezonis kvar monatojn por atingi ŝin. Interretkonekto kun Kubo eblas nuntempe, sed laŭ Johan estas nur unu interretkonekto, nome inter Kubo kaj Venezuela.

Sinjoro el Heerlen, kiu intencas prelegi pri Moresnet en la nederlanda lingvo petis de Ineke traduko de la frazo:

"Het is duidelijk dat de behoefte aan een gemeenschappelijk taal het grootst is in die gebieden waar de taal een scheidslijn vormt."

Ni iom diskutis pri la traduko de la vorto 'scheidslijn'. Ĉu devas esti barilo aŭ bariero? Unu el la tri novaj kursanoj de Wil intencas partopreni la venontan studosemajnfino. Wil demandis kiu interesiĝas pri la kolekto de kantoj, kiun ni pasintece regule uzis? Ni kontaktos Marijke Lat-houwers pri tio. Ŝi gvidas la kanthoron *Malvo*. Ni supozas, ke pri kolekto de tre

malnovaj ekzamentaskoj neniu interesiĝas. Ineke atentigis nin pri la ludo Risko sur *Edukado.net* kaj Wil pri la eblo aŭdi voĉlegatan tekston je Retradio. Luit kunportis la strategian laborplanon 2013-2017 de UEA, kiu legeblas en Interreto. Kie okazos Esperanto-kongresoj ĉi-jare? La UEA-kongreso estos en Argentino, ILEI-kongreso en Urugvajo kaj la Junulara kongreso en Brazilo.

Fine ni okupis nin pri la temo de la vespero, nome Lingva Rubriko, sed ne tiu el la revuo Fenikso, kiun ne ĉiuj kunportis, sed per la gramatikaj temoj 'La volitivo, 'de aŭ da' kaj 'neceso kaj sufiĉo', kiuj staris sur papero kunportita de Wil.

Kvaronon antaŭ la deka ni finis ĉi tiun interesan kunvenon.

20 marto 2014

La temoj de la kunveno estis: Esperantujo kaj "Domotiko" (Endoma aŭtomatigo)

Esperantujo

Ineke pri la maja renkontiĝo en Frislando: Katalin Kováts (*Edukado.net*) petis helpon por i.a. la preparado de la manĝoj. Ineke partoprenos. Oni povos tranokti en la Stay-Okay en Sneek.


Luit raportis pri la feriado de Joseph en Kongo. Joseph sciigis, ke li baldaŭ reveturos al Pollando.

Ineke ĉeestis la studosemajnfinon en Eerbeek por preparoli la venontan studosemajnfinon de la 7-a kaj 8-a de novembro en Wijk aan Zee (Natuurvriendenhuis De Banjaert).

"Domotiko"

Helpe de la nederlandlingva prezentado de HCC (Hobby Computer Club) Johan parolis pri la novaj ebloj de Endoma

aŭtomatigo. Sendube aŭtomatigo pli kaj pli ludos gravan rolon en nia vivo. La nombro de maljunuloj kreskas kaj estonte estos daŭre malpli da junuloj por prizorgi ilin. "Prizorgado je distanco" per sistemo kiel Skajpo anstataŭigos parton de la nuna prizorgadmetodo. Tiaj sistemoj estos bonaj, sed ne povos anstataŭi personan kontakton.



Domotiko kreos multajn interesajn eblojn por plifaciligi la ĉiutagan vivon, sed ankaŭ multajn eblojn, kiuj (nun ankoraŭ) ŝajne estos superflujaj.

3 aprilo 2014

Luit ricevis mesaĝon de Joseph, lia korespondamiko, kiu estis en Kongo kie li vizitis siajn parencojn. En la regiono kie loĝas la parencoj de Joseph, estas malkviete pro interna milito, sed Joseph fartas bone.

La amaso de malnovaj revuoj de Wil malgrandiĝis. Ŝi sendis kelkajn paketojn al interesiĝantoj. Ankaŭ UEA volas havi skatolon da revuoj.


Du semajnojn antaŭ Pasko la temo de la vespero estis ovoĵoj. Sur la tablo estis plado kun diversaj ornamitaj ovoĵoj, kiujn kunportis Nelly. La ovoĵoj estas faritaj el ligno, marmoro, ŝaŭmplasto, kaj estis

ankaŭ pentritaj kokaj ovojn. Feliĉe estas ankaŭ ovojn el ĉokolado.

Nelly montris al ni ilon por malplenigi ovojn. Oni pikas malgrandan truon en la ovon, kaj per la ovomalplenigilo aero estas enblovata en la ovon kaj la ovo malpleniĝas tra la truo. Per la sama aparato vi povas lavpurigi la internon de la ovo.

Wil havas grandan kolekton de memfari-taj, ornamitaj ovojn el diversaj landoj, kiujn ŝi montris al ni. Ŝi kunportis ankaŭ du grandajn ovojn el kristalo.

Wil montris el Orient-Eŭropaj landoj ankaŭ multajn paskokartojn, kiujn ŝi ricevas ĉiun jaron.



Luit legis gazetartikolon pri ferruba komercisto, kiu aĉetis Fabergé-ovon kontraŭ nur \$ 25.000,-. La vera valoro de tiuj ovojn estas kelkaj milionoj da eŭroj. La Fabergé-ovoj estas faritaj laŭ komisiono de rusiaj caroj por fordoni ilin je Pasko. Oni faris 52 unikajn ovojn el oro, arĝento, gemoj, plateno ktp. Elizabeth la dua de Britio havas kvin, dek ses el ili estas posedaĵo de privataj personoj, dek ovojn estas perditaj, kaj la resto troviĝas en muzeoj.

Luit havas ankaŭ liston kun proverbojn rilatajn al ovojn.

1 majo 2014

La temoj de la kunveno estis: Esperantujo kaj la Esperanto-kurso de Teleac

Esperantujo

Komence de aprilo Ineke partoprenis la 7-an Mezoriantan Kunvenon de Esperanto en Kartvelio (*Georgië*). Partoprenis 52 personoj el 25 landoj. La kunveno okazis en *Tbiliso*, la ĉefurbo de Kartvelio. En la ĉefstrato estas ege luksaj vendejoj kie oni vendas i.a. belajn kaj multekostajn ornamaĵojn. Vespere en la stratoj de Tbiliso multis junaj sengepatraj infanoj kaj (aliaj) almozetantoj.

La lastan tagon de la kunveno Ineke surstrate renkontis kvar armenajn virinojn, kiuj invitis ŝin al komuna butikumado. Ili vizitis i.a. kelkajn bazarojn. Estis tre agrabla tago. Ankaŭ ĉi tiun fojon ŝi aĉetis ABC-libron kiel memoraĵon.

La 8-a Kunveno okazos venontan jaron en Tunezio.

Bedaŭrinde jam dum longa tempo ne plu aperis nia informilo *La Verda Stelo*. Estas i.a. gravaj problemoj al la printilo, kio kaŭzas la malfruigon.

Johan ricevis leteron el Groningeno de persono, kiu ofertas proksimume 75 esperantaĵojn kontraŭ la prezo de 125 eŭroj. La klubo ne havas intereson.

Ineke disdonis la programon de la Kultura vojaĝo al Nederlando, kiu okazos de la 21-a ĝis la 25-a de majo. La eksterlandaj partoprenantoj vizitos i.a. Frislandon. Ineke partoprenos parton de la renkontiĝo.

Ineke sciigis, ke la 7-an de novembro okazos semajnfina aranĝo en Wijk aan Zee. La renkontiĝo havas tre interesan programon kun multe da muziko.

La 5-an de majo la klubo prezentos sin

dum la Liberiĝfestivalo en la urba parko de Groningeno.

Ineke ricevis mesaĝon de "Woordpost" de la "Genootschap Onze Taal". En tiu mesaĝo oni pritraktis la hebrean vortokombinon "tohoe wabohoe" (to-hoe wabohoe), kiu signifas stato de ĥaoso aŭ konfuzo. "Tohuvabohuo" estas titolo de kanto de Kajto, kaj precipe pro tio konata Esperanto-vorto, kiu signifas kompletan ĥaoson.

La venonta kunveno, la lasta antaŭ la somero, okazos en Il Lago la 15-an de majo. Tie ni renkontiĝos je la 6-a vespere.

Esperanto-kurso de Teleac



Wil kunportis taskojn de la Teleac Esperanto-kurso kun Kornelio kaj Vilhelmo (Koot kaj Bie). Ni diligente plenumis la taskojn.

11 septembro 2014

En la somero okazis du "kafkunvenoj", la unua en De Kosterij kaj la dua en la Elanderhus de la Scandinavisch Dorp. Luit (kaj Monica) feris sur la insulo Texel.

Inter la Esperanto-monumento kaj la apuda biciklogardejo en Den Burg estas libera spaco de proksimume du metroj. Luit trajne veturis al Steenwijk kaj faris biciklan ekskurson tra la apuda regiono. Iam Wil devis ekzameni en Steenwijk. Ŝi iris trajne, sed troviĝis en vagono, kiu ne estis ligita al la forveturanta trajno. Johan estis dufoje en Steenwijk por danci.

Mico, la prezidanto de NEJ (Nederlanda Esperanto-Junularo) vizitis Wil, kaj li kunportis hejmen plurajn jarkolektojn de JEN (Jongeren Esperanto Nieuws).

Luit sciigas, ke Joseph denove spertas kelkajn malfacilaĵojn. La restadpermesilo ne plu validis, kaj pro tio li provizore ne plu rajtis labori kaj ne enspezis monon. Krome li transkontigis sumon al siaj parencoj en Kongo pro malsano de infano.

Intertempe Joseph denove havas restadpermesilon (kiu validas por tri jaroj) kaj li denove laboras.

Luit kelkfoje sendis mesaĝon al kaj ricevis mesaĝon de siaj korespondgeamikoj en Danlando, Pollando, Brazilo kaj Nederlando.

Wil ricevis mesaĝon de sinjoro el Bulgario. En Bulgario multe pluvis, kio kaŭzis plurajn gravajn problemojn.

En pluraj landoj estas gravaj problemoj pro pluvegoj aŭ/kaj aliaj kaŭzoj (ekz. militoj).

Johan sciigas, ke *Nicolaas*, kiu antaŭ du jaroj ĉeestis malferman vesperon, estas spertulo pri Orienta Eŭropo kaj pro tio estis intervjuita en televida ĵurnalo.

Greta, lernantino de Wil, intencas partopreni la venontan UK-on en Lille.

Ni demandis nin en kiu maniero ni povos allogi interesatojn al la Malferma Vespero.

ro. Carry proponas aperigi artikolon en la regiona informilo de la kvartalo *Gravenburg* kaj sur la retpaĝaro de informilo "Westerkrant".

Nelly proponas la titolon de artikolo: "Esperanto, bestaat dat nog?" Kaj ŝi opinias, ke ni precipe emfazu la novajn (komputilajn) eblojn.

Dum la oficiala feriadperiodo Gonda laboris, sed nun ŝi ferias. Ŝi i.a. veturis al Amersfoort, Utrecht kaj Arnhem. Morgaŭ ŝi veturas kun sia patro al *Madurodam*.

Nelly kantis en la ferioj en koruso. Venon-



tan jaron ŝi iros al *York* (Anglujo) por kanti en la plej granda Mezepoka katedralo de Norda Eŭropo.

Johan aĉetis novan, modernan (ne-elektran) biciklon, kaj en la ferioj li biciklis preskaŭ ĉiun tagon, plej ofte en la direkto al *Zuidlaren* aŭ *Peize*. Ni demandis nin, ĉu ankoraŭ estas bicikloj kun pedalbremso? La respondo estas: Jes.

Wil ne vere feriis, sed ĉiun tagon ŝi promenis aŭ biciklis kun sia filo Jaap. Feliĉe lia sanstato iom post iom pliboniĝas.

Wil konstatis, ke sur tombejo *Selwerderhof* estas kapreoloj, kiuj ŝatas florojn precipe blankajn. Ŝajnas, ke ankaŭ katoj havas preferon por iu speciala koloro.

6 novembro 2014

Ĉar Johan atendis, ke li ne ĝustatempe revenos en Groningeno, la temo de la klubkunveno estis ŝanĝita: distra parolado (ĉiuj) anstataŭ dancado (Johan). Johan tamen ne malfruis.

Luit montris leteron de sia korespondamikino *Karen* en Danlando. Kiel kutime la letero estas ornamita per desegnaĵo. Luit sendas mesaĝojn ĉiam rete kaj *Karen* respondas ĉiam surpapere.

Ineke ricevis mesaĝon de Yoandra el Kubo. Ŝi petis de Ineke transdoni siajn salutojn al la membroj de nia klubo.

Luit kunportis teko-komputilon kaj montris fotojn de sia vizito al Roterdamo. Li vizitis kaj fotis sinsekve la novan bazarhalon, iaman lumŝipon, kiu nun servas kiel kafejo-restoracio, Hotelon New-York (la iaman ĉefoficejon de la *Holland-Amerika Lijn*) kaj la iaman krozadŝipon Rotterdam. Kompreneble ne mankis fotoj de Roterdamaj pontoj: la iama fervojponto 'De Hef', la tre konata 'De Zwaan' kaj la nova ponto trans la Rejnhaveno, sur kiu geamantaj paroj pendigas ŝlosilojn kiel pravigo de sia amo.

Sur la supra malantaŭa ferdeko de la *Rotterdam* Luit trinkis tason da kafo kaj ĝuis la belan panoramon.

Ineke antaŭ nelonge frue emeritiĝis kaj adiaŭis siajn kolegojn. Dum tiu adiaŭa festa kunveno ŝi i.a. montris fotojn de kelkaj vojaĝoj al Esperanto-kunvenoj dise en la mondo. Hazarde ŝi kunportis la USB-poŝmemorilon kun la fotoj, kaj pro tio ŝi povis montri la fotojn ankaŭ al la ĉeestantoj.

Per la fotoj Ineke kunportis nin al jenaj destinoj:

- la 98-a Universala Kongreso de

Esperanto en Rejkjaviko, Islando en 2013,

- la 6-a Azia Esperanto-Kongreso en Ulanbataro – Mongolio en 2010,
- la 3-a Internacia Esperanto-Semajno en Jerevano – Armenio en 2013,
- la 99-a Universala Kongreso de Esperanto en Bonaero – Argentino kaj kromtio ekskurso al Urugvajo en 2014.

En la jaro 2009 Ineke estis en Ĉinio. Tiam ŝi ne partoprenis iun kunvenon, sed vizitis la ĉinan familion de sia amikino *Jinnan Xu* kaj ŝi ankaŭ denove renkontis sian amikon *Tian Wei*.

8 januaro 2015


Ineke atentigis nin pri la artikolo "Brainstormen" en la nova Fenikso. La 14-an de februaro Esperanto Nederland en Utreĥto kunvenos por pripensi / preparoli la strategion de Esperanto Nederland. Ineke partoprenos, sed ĝis nun neniu alia membro de nia klubo anoncis sin.

La 13-an de junio okazos la jarkunveno de Esperanto Nederland. Ineke (kaj ne nur ŝi) forlasos la estraron.

La temo de la kunveno estis *vivanta gazeto*. Kompreneble ni unue parolis pri la atako al la oficejo de *Charlie Hebdo* en Parizo. Du marokdevenaj ekstremismaj islamanoj mortpafis dek du personojn. La plimulto el la viktimoj estis dungitoj de la satira semajna revuo *Charlie Hebdo*.

Ineke kunportis ekzempleron de ĵurnalo *NRC Next*, en kiu estas multaj karikaturaj, kiuj rilatas tiun atakon.

Ankaŭ Nelly kunportis plurajn karikaturojn, kiujn ŝi elŝutis de Interreto. En Vikipedio ŝi trovis artikolon pri la atako.



Ankaŭ por multaj Marokanoj / islamanoj, kiuj ja estas bonvolaj, la situacio estas granda problemo.

Luit kunportis gazetartikolojn pri:

- ★ kunvenoj de anoj de tri diversaj religioj. La kunvenoj en Groningeno okazos en la sinagogo, en moskeo kaj la Immanuel-preĝejo.
- ★ la inaŭguro de la nova urbestro de Groningeno: s-ro Peter den Oudsten.
- ★ la maldungo de brito, kiu en "Twitter" malprave sciigis, ke li koliziis kun biciklanto kaj ne haltis, ĉar li jam malfruis. La estro opiniis tiun malpravan sciigon neakceptebla kaj senprokraste maldungis lin.
- ★ la urbestro de *Weststellingwerf* anoncis, ke li ne plu akceptos la unuan trovitan ovon de vanelo.
- ★ la mortigo de pli ol 1020 rinoceroj en Sud-Afriko pasintjare. Precipe en Azio la kornoj de rinoceroj estas popularaj. Oni opinias, ke la materialo de la korno havas (nepruvitan) sanigan efikon. (Saman efikon oni atribuas al la

galo de ursoj.)

- ★ 51-jara malliberulo en Belgio, kiu petis eŭtanazion. Li estis kondamnita al ĝismorta malliberpuno kaj intertempe jam pasigis preskaŭ tridek jarojn en malliberejo.
- ★ la konsilo por laŭleĝe limigi la maksimuman rapidecon sur biciklovojoj ĝis 25 kilometroj en horo (en urboj kaj vilaĝoj).
- ★ fantomŝipoj per kiuj centoj da rifuĝintoj el kelkaj Afrikaj landoj kontraŭleĝe klopodas veturi al Eŭropo. Estas fantomŝipoj, ĉar la maristaroj forlasas la ŝipon antaŭ ol ĝi alordiĝos.
- ★ dezirbalonoj, kiujn oni lasttempe regule suprenigas okaze de evento, kiel geedziĝfestoj, entombigo, la jarŝanĝo k.t.p. La balonoj leviĝas pro interna fajro. Ĉar tiuj balonoj povas kaŭzi brulon, ili estas malpermesataj en kelkaj regionoj.
- ★ du grandaj ŝipoj en la haveno de Roterdamo; kontenerŝipo kun longeco de 400 metroj kaj la plej granda levŝipo



en la mondo, la *Pieter Schelte*. Per tiu ŝipo oni povas levi kaj transporti grandajn konstruaĵojn, per kiuj oni elfosas oleon de sub la marfundo. Ĉi tiu levŝipo estas 382 metrojn longa kaj larĝas 124 metrojn.

- ★ tertremoj kiel sekvo de la gaselfosado

en la provinco Groningeno. La tertremoj jam kaŭzis difektojn al miloj da konstruaĵoj. En la muroj kaj plafono de la romkatolika preĝejo en Bedum estas 450 fendoj.

Ineke proponas kompili liston de "novaj kaj/aŭ malofte uzataj vortoj" dum la kunvenoj.

6 junio 2015

La Esperanto-Grupo Subvisurgo



kore invitas, okaze de sia 20-jara ekzistado, al renkontiĝo sabaton, la 6-an de junio 2015.

Programo:

<http://www.akueck.de/egu/>

Aliĝo:

<http://doodle.com/tqizmk6zsdhsaw3b#table>

13 junio 2015

Jarkunveno de Esperanto Nederland en De Kargadoor, Oude Gracht 36, 3511 AP Utrecht.

25 juli ĝis 1 aŭgusto 2015

La universala kongreso de Esperanto en Lille



invitoj

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen